

AVENO # 43 - AGADO de AVE kaj de AVEanoj  
Decembro - 2017

Jen ĝeneralaj informoj pri AVE kaj aliaj CSO-oj kaj  
diversaj peticio-petoj, aliaj trovighas je Ekologio & Homaj Rajtoj

La kotizo por AVE estas libervole paginda - proponite: 5 EUR jare, pli au malpli eblas.

Nia UEA-Konto: avex-z; Konto de UEA: IBAN: NL72INGB0000378964, BIC: INGBNL2A  
Noto: (de "via nomo" por Kto. avex-z)

Elkoran dankon – Manfred Westermayer, la sekretario.  
Adreso: AVE, Kandelstr. 62, 79194 Gundelfingen/Breisgau, Germanio  
Retejo de AVE: <http://www.verduloj.org>  
Nia interreta diskutejo trovighas je Ipermy, tie serchu la grupon "Verduloj"

Koncize:  
1984 - 2014 AVE kunvenis por festi la 30-jarighon:

Ni tradukis la Manifestojn 2014 de la Europaj Verdaj Partioj (trovebla sur [www.verduloj.org](http://www.verduloj.org))  
- Federacio de Junaj Europaj Verduloj  
- Europa Verda Partio: [europeangreens.org](http://europeangreens.org)  
- tutmonda asocio de verdaj partioj: [GlobalGreens.org](http://GlobalGreens.org)

La projekto <http://www.lingvo.info> celas provizi informojn pri lingvoj kaj diskonigi plurlingvecon en la interreto ... La retejo estos havebla en almenaŭ 17 lingvoj ekde sia lanĉo.

Internaciaj Ago-Tagoj (nur kelkaj)  
01-27 : Rememortago pri la kruelajhoj de la fashismo (liberigo de la koncentro-lagero Auschwitz)  
02-21 : Internacia Tago de la Patrino Lingvo  
03-08 : Internacia Tago por Virinoj  
03-10 : Internacia Tago por la Autonomio de Tibeto  
03-21 : Tago de la Mondcivitanoj  
03-22 : Internacia Tago por la Akvo  
04-20 : Tago de la Tero  
05-09 : Europa-Tago  
05-15 : Nakba-memortago pri la forpelado de araboj el la nov-fondita ŝtato Israelo (1948)  
05-21 : Internacia Tago por la Kultura Evoluo  
06-08 : Tago de la Maroj  
06-11 : Internacia Tago de la Lingvoj  
....  
=== Detale lau la dato =====  
(kutime mi uzis la literumadon ch ... u )

2017-12-20 Karaj geamikoj, jen mia jarfina letero:  
vi certe legis kaj audis sufiche multe pri la nunaj krizaj regionoj; pro tio mi rezignas lamenti.  
Simple esperas ke chie-ajn okazos pozitivaj solvoj, dank al saghaj kaj pacemaj homoj.

#### **Pri AVE 2018:**

ni bezonas sekretarion\* kiu transprenas la agadon plej malfrue dum la **UK en Lisbono**.  
Felicite mi trovis respondeculon en mia loka klubo kiu zorgas ke la **publika kunveno de AVE** okazos dum la UK, ĉar mi decidis ne partopreni; sed ŝi ne estas membro de AVE.

**La nova sekretario** devus esti membro de iu Verda Partio - au kunlaboranto de ekologia-civilsocia CSO/NRO. Salajro kaj pagoj por kongresoj ghis nun ne estas.  
Nuntempe la kaso estas negativa, sed mi postlasos ghin en pozitiva stato.  
AVE estas kunlaboranta fakasocio de UEA.

Krome ni kunlaboras (malofte) en la ekologia frakcio de SAT.  
Se kandidato por la sekretario partoprenas la UK - sufichas la persona prezentado.  
Alimaniere necesus skribita subteno de aliaj esperantistoj, prefere membroj de AVE.

Georges Sossois komencis **kunlabori kun la Verdaj Partioj** en Europo, tamen mankas kunlaboro kun Verdaj Partioj en la aliaj kontinentoj; kaj kun la Tutmonda Asocio de Verdaj Partioj [www.globalgreens.org](http://www.globalgreens.org).

La **Per-Esperanto Agado** - nuntempe en Tanzanio kaj D.R. Kongo - reduktighos, se neniu pretas transpreni ghin. Mi kunlaboros kun la nova sekretario chi-rilate; sed je reduktita forto.  
Unuflanke al mi mankas la aliro al richuloj kiuj pretas forte subteni tian evolu-helpan agadon; aliflanke AVE ne estas formala asocio, do, ne havas aliron al publikaj fondusoj; pro tio mi jam plurfoje plendis, ke UEA instalu tian organizon, kiu rajtas financi evolu-helpajn projektojn - enkadre de la **Daureblaj Evoluo-Celoj** (SDG) lanchitaj 2015 de UN.

**2018-03-21/23 en Bonn okazos la festivalo de SDG** - ni povus partopreni kaj montri niajn ekzemplojn.

\*) bonvolu legi chiam ke temas pri viro (viricho) au virino.  
Bondezirojn, amike, manfred

2017-09-03 **Per-Esperanto-Agado de AVE:**

- por la komenca parto de knabina gastigejo/internato en Marambeka/Tanzanio (enkadre de la projektaro Mazingira de Mramba Simba NYAMKINDA) ni kolektis 6.600 Euroj. Grandan dankon al Janek, kiu instigis kaj organizis ke fonduso de dungantoj de firmao Bosch pagis 5.200. Tamen, pli da knabinoj kun longa vojo al la mezlernejo bezonas tian logh-eblecon.

- por la kvara parto provizi salubran trinkakvon en Kalima/DR Kongo (enkadre de la projektaro PIEADC de Etienne KATCHELEWA) ni kolektis 9.100 Euroj. Grandan dankon al Wasserkraft Volk AG, kiu denove subtenis, chi-foje per 8.677 Euroj. Char necesas prepari novan fontanon tiu sumo ne sufichos. Ni petis alian fonduson kun-subteni per simila sumo; do, ni daurigas kolekti, jam dankas al Emile MAS pri anonco subteni.

- nova malgranda projekto en Uvira, ankaŭ proksime de Goma, kie temas pri rearbarigo kaj kultivi arbidojn kaj legomojn, agado de esperantistaj lernantoj, gvidataj de Martin FADHILI. Komenca kontribuo de AVE estis 200 Euroj, kaj avizitaj 400 de la Amikoj de Wangari Maathai.  
Detaloj: [verduloj.org/Per-Esperanto-Agado.pdf](http://verduloj.org/Per-Esperanto-Agado.pdf)

**Mi petas vin kontribui al nia UEA-konto: avex-z** (rimarko: Uvira au Kalima)

---

2017-08-30 **UEA kaj dauripova turismo**

AVE dum multaj jaroj klopodis amendigi la UEA-statuton pri sin-devigo al dauripovo. Evidente tiu amendo ne realighos (almenau ne dum mia tempo kiel sekretario de AVE). Diversaj UEA-respondeculoj opinias, ke AVE, kiel kunlaboranta fakasocio de UEA pri ekologio, pritraktu tiun temon, informu kaj donu konsilojn kio eblas kaj kio observindas por ke ni (la esperantistaro) estu plejeble naturmedio-afablaj kaj malplej forkonsumantaj la resursojn. Ja, la UK-temo de 2017 estis jhus dauripova turismo - chi-sube el la diskutoj kaj la koncernan UK-rezolucion. El la IJK 1997 en Asisi venis konsiloj pri pli dauripova kongresado & turismo, kiun ni aktualigis, kaj aktualigos:  
[verduloj.org/k\\_kongres.htm](http://verduloj.org/k_kongres.htm)

**Daŭripova turismo estis la temo de la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto**

**30 julio 2017.** Observe al la Internacia Jaro de Daŭripova Turismo por Evoluigo, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj (UN) por 2017, la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto, en Seulo, Korea Respubliko, pritraktis la temon "Turismo kaj evoluo: Vojo al daŭripovo." En kvin sesioj sub gvido de Stephanie Cabovianco (Argentino), la kongreso notis "la urĝecon redukti la ekologiajn kaj sociajn damaĝojn, kiujn kaŭzas multaj formoj de turismo, kaj disvolvi novajn kaj pli daŭripovajn formojn." La temo aparte gravas al parolantoj de Esperanto ĉar "ties anoj ofte vojaĝas por renkonti unu la alian kaj por ekkoni la riĉecon de aliaj kulturoj." La kongreso emfazis "la esencan rolon kiun ludas komuna lingvokono en la perado de reciprokaj kontaktoj inter homoj de malsamaj kulturoj, kaj la unikajn kontribuojn de Esperanto sur tiu kampo" kaj konfirmis "la volon de nia movado daŭre labori por aktive engaĝi, eduki kaj inspiri homojn en ĉiuj landoj al pli inkluziva kaj

konscia turisma kulturo.”

Farante tion, ĝi eĥis multajn aliajn deklarojn pri la ligo inter turismo kaj lingvoj, faritajn tra la jaroj, inkluzive de la Manila Deklaracio de la Monda Turisma Organizaĵo de UN (1985), kiu substrekis “la gravecon de scio de lingvoj, precipe tiuj kun universala celo, kiel Esperanto.”

Ĉeestis la kongreson 1174 parolantoj de Esperanto el 61 landoj.

Sekvas la plena kongresa rezolucio:

Ni, 1174 partoprenantoj en la 102-a Universala Kongreso de Esperanto, venintaj el 61 landoj de ĉiuj mondopartoj al Seulo, Koreio,

**Volante kontribui** al la laboroj por la Internacia Jaro de Daŭripova Turismo por Evoluigo, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj (UN) por 2017,

**Diskutinte** la temon “Turismo kaj evoluo: Vojoj al daŭripovo” en pluraj sesioj kaj el multaj vidpunktoj tra la kongresa semajno,

**Konstatante** la gravecon de daŭripova turismo por la tutmonda Esperanto-lingvokomunumo, kies anoj ofte vojaĝas por renkonti unu la alian kaj por ekkoni la riĉecon de aliaj kulturoj,

**Emfazante** la esencan rolon kiun ludas komuna lingvokono en la perado de reciprokaj kontaktoj inter homoj de malsamaj kulturoj, kaj la unikajn kontribuojn de Esperanto sur tiu kampo;

**Asertas** la urĝecon redukti la ekologiajn kaj sociajn damaĝojn, kiujn kaŭzas multaj formoj de turismo, kaj disvolvi novajn kaj pli daŭripovajn formojn;

**Invitas** aktivulojn pri daŭripova turismo konsciiĝi pri la grandaj avantaĝoj de komuna neŭtrala lingvo por la kultivado de respondecaj kaj reciprokaj rilatoj inter turistoj kaj gastigantoj;

kaj

**Konfirmas** la volon de nia movado daŭre labori por aktive engaĝi, eduki kaj inspiri homojn en ĉiuj landoj al pli inkluziva kaj konscia turisma kulturo.

(laŭ retinformo de [Esperanto.UN@gmail.com](mailto:Esperanto.UN@gmail.com) )

Aktuala agado:

**2018-07-29... AVE kunveno okaze de la UK en Lisbono**

Espereble ni trovos homo(j)n, kiuj daurigis la bazan agadon de AVE, kaj eble ankaŭ la Per-Esperanto-Agadon. Por la kunlaboro al la Europaj Verdaj Partioj jam danke kun-laboras George Sossois.

2017: La **UK en Seulo** diskutis i.a. pri turisma daŭripovo - la rezolucio priskribas la temon kaj postulas praktikeblajn solvojn.

AVE jam de 1998 postulas de UEA amendi sian statuton per la temo daŭripovo - laŭ la postuloj de UN kaj Agenda 21 k.t.p.; sed UEA bedaŭrinde hezitas. Jen kion ni postulis dum la UK 2015 en Lillo.

" La gvidprincipoj de Paco, Homaj Rajtoj kaj Daŭripova Evoluo,

kiaj ili estas difinitaj de la UN (UNDP, UNEP), UNESCO

kaj aliaj internacie rekonataj institucioj , estas por la laboro de UEA esencaj kondiĉoj."

---

La AVE-kunveno kun 10 partoprenantoj enkadre de la **IJK en Aneho**, Togolando, okazis dank al Francois Hounsounou. Evidente pro ĝenerala intesta malsanigo la IJK spertis problemon.

---

**Koran dankon** (denove) al ĉiuj kiuj subtenis la projekton "internato / gastigejo por lernantoj en Marambeka (enkadre de projektoj Mazingira de Mramba Simba, Tanzanio). Finfine dank al subteno de kunlaborantoj de firmao Bosch eblas konstrui la unuan parton.

- -

Lasta alvoko por ĉi-jare subteni la **4-an projekton "Akvo por Kalima"**:

ni ricevis de afabla firmao WKV AG 8.677 Euroj, krome ch. 400 de du AVE-anoj - sed ni esperis almenaŭ 2.000 - kaj mi esperas nun ke Vi povus kontribui ankoraŭ al **nia UEA-konto: avex-z** ghis komenco de Septembro.

Se ĉiu el niaj ch. 300 membroj subtenos per 5 Euroj ni sukcese atingos la bezonatan sumon por realigi la plej gravan parton de tiu projekto. La civitanoj de Kalima mem kontribuas - pere de la pagado por akvo che la jam instalitaj 4 akvo-kranaroj.

Se vi informos min paralele, mi antaŭpagos tiun sumon, ĉar la UEA-kaso ne tiom rapide laboras.

Mi volonte sendas al vi la informon en Esperanto au en la germana, inkluzive de konto de germana fonduso, kiu afable subtenas la projektojn, se vi pretas subteni per pli granda sumo (100+x Euroj), kiu formale subtenas nin "Stiftung Brücke".

Mi ne kunsendas alkrochajhon, ĉar tiam la mesaĝo povus esti detektata kiel spamo.

Vi povas legi ankau sur nia retejo: [verduloj.org/afriko.htm](http://verduloj.org/afriko.htm)

kaj je: [verduloj.org/Per-Esperanto-Agado.pdf](http://verduloj.org/Per-Esperanto-Agado.pdf)

Chiukaze bondezirojn al vi, amike, manfred

--

2017-08 IJK en Lome

Chu iu e vi partoprenos la IJK en Lome, kaj pretus organizi AVE-kunvenon dum 1-2 horoj ?

Antoine kunportos la chefajn informilojn (fakte 3 diversaj unu/du paghaj) pri nia agado.

--

2017-06-29 Per-Esperanto-Agado – aktualaj projektoj survoje

#### 1. Knabina gastigejo:

dank' al Janek ni ricevis grandan subtenon (5200 EUR) de kunlaboranta fonduso de granda germana firmao, kiu subtenas la **konstruon de la knabina gastigejo** (internato) en Marambeka. Tie estas la mezlernejo, Esperanto Secondary School, enkadre de la projektaro Mazingira, organizata de Mramba Simba. La unua pago de 1000 EUR, kiun ni kolektis dank al kelkaj la AVE-anoj kaj okaze de aliaj kunvenoj, jam estas uzata por konstrui la fundamenton. Kaj venos plia sumo (320) kolektita je la IFEF-jarkunveno & regiona stagho en Colmar, kaj je GEK & EEU en Friburgo; krome anoncite estas 950. Do, sume 7470. La unua celo estis 6 mil por ebligi la tranokton de 8 knabinoj dum la lerneja tempo. Sed la dua celo estis 10 mil por 16 knabinoj. Do, mankus nur 2530 por la plena projekto (por 16 knabinoj). Mi esperas, ke lokaj civitanoj (gepatroj) kaj la administrejo de la vilagharo povas kontribui – kaj petas al Mramba pripensi tion.

#### 2. Akvo por Kalima, kvara projekto:

Feliche ni ankau ricevis la konfirmon de la germana firmao WKV AG pri mezgrandaj hidroelektraj centraloj, ke ili subtenos - pli grande ol antaue - ankau tiun 4-an projekton en Kalima, provinco Maniema, DR Kongo, kiun surloke organizas Etienne Katchelewa. La problemo estas ke ankau la plano estas pli granda.

Fakte ni kalkulis por 25.000 EUR, ĉar necesas prepari novan fonton. Pro la paralela projekto (por la gastigejo) ni ghis nun ricevis nur etan sumon de AVE-anoj (100).

Mi supozas ke la mono de WKV venos ghis fino de Augusto – do, mi esperas ke ankau vi, AVE-anoj povus kolekti iom pli ghis komenco de Septembro.

Mi klopodos serĉi kunhelpon de alia fonduso.

Kaj Etienne devus redukti la planon, konstrui nur la plej gravan.

Do, mi petas vin, se vi povas, bonvolu subteni (denove) „Akvo por Kalima“. Pri la detaloj bonvolu rigardi en nia retejo:

<http://www.verduloj.org/Per-Esperanto-Agado.pdf>

jen la raportoj pri tiaj projektoj: [verduloj.org/afriko.htm](http://verduloj.org/afriko.htm)

#### 3. Rearbarigo kaj legom-ĝardeno en Uvira

Uvira, provinco Suda Kivuo, DR Kongo, organizita de Martin Fadhili

- lernopago por **orfoj** (momente ni subtenas 2 georfojn),

- **Rearbarigo** kaj ĝardeno-projekto (malgranda unua projekto, komence de Augusto 2017):

La plano estas subteni la agadon de lernantoj dum iliaj ferioj, ghis nun per 200 euroj.

Bonvolu subteni unu el tiuj projektoj kaj donaci al nia UEA-konto: avex-z,

au rekte al la bankkonto de UEA: BIC: INGBNL2A, IBAN: NL72INGB0000378964

Se vi loghas en Germanio kaj ŝatas ricevi kvitancon de la fonduso, vi povas transpigi rekte al

Stiftung Bruecke, Ernst-Barlach-Str. 45, DE-79312 Emmendingen

retejo: [Stiftung-Bruecke.de](http://Stiftung-Bruecke.de) (kiu estas formala organizajho, kontraste al AVE)

IBAN: DE12 1002 0500 0003 2474 04, BIC: BFSWDE33BER,

Bonvolu mencii la projekton („akvo por Kalima“, „internato“ au „Uvira“), kaj vian nomon; kun adreso se vi transpagas pli ol 100 EUR.

### 2017-07-02 **urgha petiticio: Krakovo & Bielowieza Praarbaro**

Eble vi jam audis pri tiu granda praarbaro sur la lim-regiono de Belarusio kaj Pollando, elstara natur-trezoro en tuta Europo. Sur la pola flanko komencis nuntempe – en somero !! - ligno-falisto kun siaj grandaj arbovoraj mashinoj – detruis ghin (areo post areo). Tie vivas la sovaghaj bizonoj, kiuj bezonas sufiche grandan areon. Kaj dum somero oni ne rajtas faligi arbarojn (escepte eble la forst-kulturoj).

Ne imageble: evidente la naci-konservativa registaro permesis la grandskalan arbo-faligadon. Biologo Tomasz Wesolowski ege chagrenighas: „Iam kolapsas la arbaro, kaj ne plu estas regajnebla.“ (kiel praarbaro) Je la 2-a de julio renkontighos en Krakovo la Grupo pri la „Tutmonda Heredajhoj“ de UNESKO.

Bonvolu subskribi la peticion de la CSO „por savi la pluarbarojn“.

<https://www.regenwald.org/petitionen/1100/bialowieza-urwald-erhalten-holzfaeller-stoppen>

Subskribi rajtas chiu, ech se tiu alvoko estas nur en la germana lingvo - Anticipan dankon !

--

### 2017-06-13 Subteno per maklerejo.de

Eble por vi ne estas novajho ke ekzistas retejo por inform- kaj peto-intershanghoj en Esperanto, kies strukturo estas lau chirkau 50 kapvortoj; kaj per rekta serchebleco.

Se vi serchas „Afriko“ vi ankaŭ trovos nian Per-Esperanto-Agadon en Afriko.

Koran dankon al la organizanto, Frank Merla.

Jen: [www.maklerejo.de](http://www.maklerejo.de)

--

### 2017-06-08 **Tago de la Maroj**

Eble indas denove legi mian raporton pri plastajhoj en la maroj kaj aliaj akvaroj:

Trovebla kun pluraj aliaj informoj - tie: [www.verduloj.org/akvo.htm](http://www.verduloj.org/akvo.htm)

Plastajhoj pli kaj pli ghenas la marajn organismojn.

Troa uzo de sterko kaj aliaj fekundenzoj zorgas por la amasa florado de algoj, kiu kreas venenon al fishoj ktp. La plimultigo de CO2 (karbondioksido) en la aero ankaŭ influas la maron – kun la sekvo ek la akvo ighas acideta – tion (kaj la plivarmighon) la koral-rifoj ne eltenas – ili palighas kaj sekve de tio povas morti. Nigraj abgasoj de ŝipoj kaj teknikaj bruoj damaghas la marbestojn.

Do, ni pripensu – kion ni mem povas fari ??

Eble malpli uzi importitajn ekzotikajn fruktojn kaj viandon (pro la soj-faba transportado).

---

### 2017-06-04 shangho che AVE

Okaze de la kongresoj de GEA kaj EEU ni kunsidis en malgranda rondo. Tamen iomete sukcese:

Mi volas retirighi de la sekretaria posteno de AVE plej malfrue ghis la jarfino 2017.

Niaj diversaj fakoj estas: Fari la organizan laboron pri membroj kaj financoj, inkluzivas regulan sendon de novajhoj al la AVE-membraro. n.n.

Kunlaboro kun la Verdaj Partioj:

George Sossois (membro de la verda partio Ecolo en Belgio) pretas daurigi la kunlaboron kun la verdaj partioj. Koran dankon, George! Char vi loghas en Bruselo kaj jam konas la respondeculojn de la Europaj Verdaj Partioj, estas aparte pozitive.

Informi la esperantistojn pri la Verd-partiaj programoj kaj kunlabori kun CSO-oj de la Esperanto-Movado (UEA kaj SAT, krome Vegetaranoj, Biciklistoj, k.a.) - sendi AVENO. n.n.

Per-Esperantaj Evolusubtenaj projektoj: n.n.

---

### 2017-07-17/27 **Chu AVE denove che Alternativa semajno en Gresillon ?**

Post plurjara paŭzo, [Greziljono planas](#) ree organizi Alternativan semajnon de la 17a ĝis 27a de julio, tuj poste sekvos FESTO.

Tiu periodo celas do homojn, kiuj NE iros al UK (Seulo, Koreio) au IJK (Aneho, Togolando)

Ni serĉas homon kiu instruas E-on dum iom longa tempo (10 tagoj)

Ni planas ĉi-foje veganan manĝon, ne nur vegetaran.

(dankon al Bert por la propono ! - pli je: [gresillon.org](http://gresillon.org))

--

2017-03-01/03 **TEJO** partoprenis al **Tutmonda Festivalo de Ideoj por Daŭripova Evoluo** organizita de **Unuiĝintaj Nacioj**, Bonno, Germanujo. La evento celis pridiskuti la plej taŭgajn kaj efikajn kielojn atingi la **17 daŭripovajn celojn** en la 2030'a Tutmonda Tagordo de Unuiĝintaj Nacioj. Jen la raporto: [www.tejo.org/tejo-partoprenis-en-tutmonda-festivalo-de-ideoj-por-dauripova-evoluo/](http://www.tejo.org/tejo-partoprenis-en-tutmonda-festivalo-de-ideoj-por-dauripova-evoluo/)  
Ghi inkluzivas ret-ligon al tre instiga rap-kanto pri la aktualaj 17 Evoluo-Celoj de UN  
Ghis nun en la angla – eble iu tradukus la subtitolojn ?  
[http://www.verduloj.org/UN-Celoj\\_2015-2030.pdf](http://www.verduloj.org/UN-Celoj_2015-2030.pdf)

--

2017-03 ECI: [stopglyphosate.org](http://stopglyphosate.org)  
Mi informis en Februaro pri tiu Europa Civitana Iniciativo kontraŭ Glifosat.  
Intertempe preskau duona miliono subskribis.  
Sed bezonatas 1 miliono da subskriboj de EU-civitanoj.  
Komuna agado de multaj ekologiaj organizajhoj kun la celo malpermesi uzi Glifosat-on  
(angle: Glyphosate). Aktuale la ECI uzas 5 lingvojn.  
La retejo ankau montras la argumentojn: [Stopglyphosate.org](http://stopglyphosate.org)

---

2017-07-17/27 **Chu AVE denove che Alternativa semajno en Gresillon ?**

Post plurjara paŭzo, [Greziljono planas](http://gresillon.org/spip.php?rubrique2&lang=eo) ree organizi Alternativan semajnon de la 17a ĝis 27a de julio, tuj poste sekvos FESTO.  
<http://gresillon.org/spip.php?rubrique2&lang=eo>

Tiu periodo celas do homojn, kiuj NE iros al UK (Seulo, Koreio) au IJK (Aneho, Togolando)  
Ni serĉas homon kiu instruas E-on dum iom longa tempo (10 tagoj)  
Ni planas ĉi-foje veganan manĝon, ne nur vegetaran.  
(dankon al Bert por la propono ! - pli je: [gresillon.org](http://gresillon.org))  
Ĉu tiu propono povus interesi AVE-on ? Bonvolu skribi se vi interesighas partopreni.

--

2017-02 **Subteno al orfoj en Uvira, D.R. Kongo**

Jen mesagho de Martin FADHILI ENZO en Uvira, kiu zorgas – same kiel Alphonse kaj Mramba Simba por orfoj kiuj ne povas pagi la kostojn por la lernejo:

1. Matena Osee, (v) 03/01/2005 , meza Lernejo, 1a Klaso.
2. Ndanya Alex, (v) 20/12/2000, meza Lernejo, 6a Klaso.
3. Bukuru Reponse, (v) 03/05/2008, baza Lernejo, 1a Klaso.
4. Butoto Merci, (v) 03/05/2008, baza Lernejo, 1a Klaso.
5. Meta Prisca, (i) 05/02/2000, meza Lernejo, 6a Klaso.
6. Anne Marie, (i) 14/03/2001, meza Lernejo, 5a Klaso.
7. Bijou Kalimba, (i) 06/09/1999, meza Lernejo, 5a Klaso.
8. Amrani Yope, (v) 10/01/1999, meza Lernejo, 6a Klaso.
9. Bapemacho Grace, (i) 20/08/2007, baza Lernejo, 3a Klaso.
10. Espoir Ombeni, (v) 13/09/2002, meza Lernejo, 3a Klaso.
11. Joseph Kawaya, (v) 21/07/2004, meza Lernejo, 1a Klaso.

Por daurigi la lernadon ili bezonas **6 Eurojn monate** – por 10 monatoj jare.

Se iu el vi pretas transpigi por unu orfo estus konkreta helpo; aldona helpo por nutrajho kaj lernomaterialo estas bonvena. Martin subtenas ilin kaj instruas Esperanton; li certe sendos foton de la orfoj.

Li ankau petis Esperanto-materialon; sed tio chefe estu afero de Esperanto Plus au de la Afrika Oficejo de UEA. Vi povas transpigi al la UEA-konto de AVE: [avex-z](mailto:avex-z)  
Ret-adreso de Martin: [fadhilienzomartin202@gmail.com](mailto:fadhilienzomartin202@gmail.com)

--

2017-07-20/08-12 **Biciklado kontraŭ atomenergio kaj tele-milito en Svisio kaj Germanio:**

La ekologiisma biciklado "tour de natur" sekvontsomere iros de Bazelo al Mannheim kaj Ramstein, de kie Usono gvidas la spavoj (tele-stirataj aviadiloj) kiuj fotas kaj pafas en la orientaj regionoj.

Bele estus se partoprenus pluraj esp-istoj.  
Informoj haveblas je <http://www.tourdenatur.net>  
Dankon al Ronaldo N

—

### 2017 AVE-anoj subtenas la konstruon de gastejo por knabinoj en Marambeka

Pluraj samideanoj en Europo, inter ili de AVE, ek-financis kaj subtenadas la mezlernejon Esperanto Secondary School en Marambeka, Tanzanio; unu el la Mazingira-projektoj de Mramba Simba.

Unu el la urghaj bezonoj estas gastejo (tranoktejo) por lernantinoj kiuj loghas en granda distanco de la lernejo, ĉar pluraj el ili survoje estis sekse perfortitaj kaj gravedighis; kaj pro tio devas fini la lernadon. Tial la lernantinoj petis konstrui tranoktejon. La vilagharo pagos la laboron, sed ne havas monon (ĉ. 6.000 Euroj) por konstru-materialo – kaj krome necesos (simplaj) mebloj.

Ni petis subtenon de fonduso de firmao Bosch, krome AVE kontribuos almenaŭ per 1000 Euroj.

Ni ankoraŭ ne scias, ĉu Bosch akceptos. La konstruo devus komenci plej baldaŭ.

Se vi povas – bonvolu transpigi al la UEA-konto de AVE: avex-z

En Germanio ni kolektas sur la konto de „Stiftung Bruecke“, Internet: [www.Stiftung-bruecke.de](http://www.Stiftung-bruecke.de)

Bank f. Sozialwirtschaft, IBAN: DE12100205000003247404, BIC: BFSWDE33BER

--

### 2016-11-19 subteni Esperanto-lernantajn junulojn en Goma, Nord-Kivu, D.R. Kongo

Alphonse WASEKA, kiu organizas subtenas la projektojn de AVE „Akvo por Kalima“, organizas subtenadon por orfoj au malriĉaj geknaboj kaj gejunuloj, ke ili povu pagi la lernejon kaj studadon. La lernantoj havas diversajn religiojn: inter ili kristanaj, kaj bahaaj .

La retejo de Solidareco Bona Volo montras la infanojn kun informoj, kaj ankau rakontas pri la kruela historio de D.R. Kongo. Krome ghi provizas plurajn film(et)ojn pri tio.

La retejo estas ankau en Esperanto, kaj je „Komenco“ vi trovos butonojn por trovi la diversajn sub-paghojn:  
<http://solidarecobonavolo.weebly.com/kiel-helpi.html>

---

**2017-01 Koran dankon al ĉiuj kiuj subtenis AVE-on en 2017** pagante kotizon kaj eĉ donacojn, tiel ni povas daurigi la laboron; kaj al tiuj kiuj kontribuis per informoj kaj tekstoj; i.a. celante ke UEA amendas sian statuton pere de sin-dedicho al Daurigeblo.

Dum 2016 okazis renkontiĝo okaze de la SAT-Kongreso en Herzberg.

Ni subtenis la projektojn Mazingira per 7.592 Eurojn

pagis la lerno-kostojn por ĉ. 25 orfoj en Tanzanio kaj preskau 800 Eurojn por operacioj;

kaj la plej granda estis financado de pluvakvo-baseno en Nyaburundo, raporto sekvos.

Pli kaj pli afrikaj samideanoj klopodas lanchi projektojn, sed por tia pli vasta financado mankas strukturo en Esperantujo - naciaj fondusoj por evolu-helpo kiuj uzas Esperanton kaj rajtas doni oficialan donaco-kvitancon.; kaj tiamaniere ankau povus ĉerpi monon de la nacia evolu-ministerio.

--

**2017-06-02/05 Mi invitas vin partopreni la AVE-kunsidon en Freiburg/Breisgau** okaze de la Kongesoj de EEU- kaj de la Germana Esperanto-Asocio, kiu okazos je Pentekosto.

Je la UK au SAT-kongreso en Koreio povus okazi alia kunveno de AVE-anoj, sed bedaŭrinde sen mia partopreno.

En unu el tiuj kunvenoj **ni esperable trovos sekretarian posteulon por AVE.**

Kiu ne povas partopreni, rajtas jam antaŭe sin-proponi per konciza informo.

Unue: Kompreneble la persono devas paroli flue Esperanton - almenaŭ mezbone.

Due: Estus bone se ankau la estonta sekretario estas membro de Verda Partio (nomo ne gravas), sed gravas ke tiu partio apartenas al unu el la kontinentaj Federacioj de Verdaj Partioj ; tion vi povas kontroli ĉe [globalgreens.org](http://globalgreens.org) .

--- fino ---